

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 1an de oktobro 2009 per Skype.

(Aprobata la 12an de novembro 2009.)

Partoprenis:

Jardar Eggesbø Abrahamsen en Trondheim
Ulf Lunde en Os
Anne Karin Bondhus en Bryne
Asbjørn Lindh en Oslo
Geir Arne Paulsen en Tromsø ekde punkto 2
Eli Eriksen Fitjar en Bergen
Ingebjørg Rambjør en Bergen

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la pasinta interkonsiliĝo la 27an de aŭgusto

La protokolo estis aprobata.

2. Ekonomio

La kasisto raportis pri la ekonomio, kaj nun stas tiel:

Skagen Høyrente: kr. 56.607

Skagen Vekst: kr. 30.119

Tio signifas kreskon de preskaŭ 1 000 kronoj dum unu monato.

3. Kotizo

La kasisto informis ke la abonkotizo de *Norvega Esperantisto* en 2010 estos 105 kr, laŭ la vivkosta indico kresko post 1998.

La Landa Kunveno altigis la membrokotizojn en 2007. Laŭ la vivkosta indico kresko post 2008 la membrokotizo en 2010 estos 320 kr por plenkreskuloj (plialtiĝo de 10 kr). Por junuloj kaj samdomuloj ĝi restos 210 kr.

4. Jen nia mondo

Antaŭ kelkaj jaroj NJE komencis traduki la lernolibron *Jen Nia Mondo* norvegen, sed ĝis nun ne finis la projekton. Intertempe la sveda versio elĉerpiĝis, kaj Douglas Draper demandas la estraron de NEL, ĉu estas espero ke aliuloj povus transpreni la laboron.

La estraro de NEL atentigas ke tio estas projekto de NJE, ne projekto de NEL.

Ni nek rajtas nek volas urĝi NJE-n. La projekto estas tiom valora, ke ni male tre ĝojas ke NJE havas tian projekton, ĉu ĝi progresas rapide, ĉu malrapide.

5. Interretaj socioj

Ulf starigis demandon pri kiel NEL povos iĝi pli videbla kaj pli aktiva en interretaj socioj kiel Facebook, Twitter, ktp. Post diskuto ni decidis membriĝi en kaj Twitter kaj Facebook.

Adreso ĉe Twitter: <http://twitter.com/esperantonytt>

Kaj adreso ĉe Facebook: <http://www.facebook.com/pages/Norvega-Esperantista-Ligo/22702653116>

Ulf respondecas pri la Twitter-paĝo. Tie ni tвитros pri festoj, aranĝoj, kursoj, estraraj interkonsiliĝoj, ktp.

6. La telefono en Esperantonia

La telefono lasttempe ofte malfunkciis, sed ŝajnas ke Herman Ranes nun sukcesis ripari ĝin.

7. Norvega Pacocentro

Post la pasinta interkonsiliĝo la estraro petis Douglas Draper kaj Asbjørn Lindh reprezenti la Ligon ĉe Norsk Fredssenter. Ili decidis ke Douglas estu reprezentanto kaj Asbjørn estu anstataŭanto.

8. Eventualaĵoj

Nenio.

La interkonsiliĝo daŭris inter 19.30 kaj 20.53.

Raportis Ingebjørg Rambjør.

La venonta interkonsiliĝo okazos la 5an de novembro (prokrastitia ĝis la 12a de novembro).